

Nikolaus Lenau,

Aŭtuno

tradukita de Manfred Retzlaff

Mutiĝo kaj senkoloriĝo:
La vento flate min tuŝetas,
foliojn arboj nun demetas;
min ravas tiu formortiĝo.

Foriĝas de ĉi tie ĉio,
la amon oni jam forgesis,
la birdoj longe kanti ĉesis,
mallaŭte sinkas la folio.

La birdoj estas forflugintaj,
iliaj nestoj videbliĝas,
folioj lacaj subeniĝas
de branĉoj senfoliĝintaj.

En la arbara susurado
alblovas min sciigo iu,
ke estas formortiĝo ĉiu
sekreta, gaja nur ŝanĝado.

*Traduko de la Germana poemo "Herbst" de NIKOLAUS LENAŬ (*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-628-1270 (2012-10-26 14:31:44)

Nikolaus Lenau,

Herbst

Rings ein Verstummen, ein Entfärben:
Wie sanft den Wald die Lüfte streicheln,
sein welches Laub ihm abzuschmeicheln;
ich liebe dieses milde Sterben.

Von hinnen geht die stille Reise,
die Zeit der Liebe ist verklungen,
die Vögel haben ausgesungen,
und dürre Blätter sinken leise.

Die Vögel zogen nach dem Süden,
aus dem Verfall des Laubes tauchen
die Nester, die nicht Schutz mehr brauchen,
und Blätter fallen stets, die müden.

In dieses Waldes leisem Rauschen
ist mir, als hör' ich Kunde wehen,
daß alles Sterben und Vergehen
nur heimlichstill vergnügtes Tauschen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas NIKOLAUS LENAŬ (*1802-08.13 – †1850-08-22).*

Arg-628-1269 (2012-10-26 14:35:29)

La poemo troviĝas interalie en http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/len_n03.html. Pri la poeto vidu la germanan version de vikipedio http://de.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau.